# INTER★NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 258 Oktobro, 2007



Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — Kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5



Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## DUA VIVO

Esperanta lando jam ekzistas – en kiberspaco. Pli ol 250 enloĝantoj aliĝas al la lando. Ni kunvenas kaj babilas voĉe kaj per tajpado. Ĝi estas tridimensi-aspekta lokaĵo kun plantoj kaj konstruaĵoj kie avataroj kunsidas. Por viziti, oni devas unue aliĝi al „Second Life" (Dua Vivo), kreaĵo de Linden Labs. Aliĝo al tiu virtuala mondo estas senkosta. Due, oni devas konstrui avataron – ekranan personon (aŭ beston) kun korpo, vestoj (eble), eble flugiloj, aŭ kiu ajn formo kaj koloroj kiujn vi deziras. Kompreneble la esperantistoj en DV estas multe pli belaj ol tiuj en la unua vivo. En DV iliaj genoj ne kreas ilin, sed iliaj imagoj faras iliajn aspektojn. Trie oni teleportas (ekvojaĝas per unu klavara puŝo) al Esperanto-Lando, kiu estas kreaĵo de Erick Nykvist. Li pagas al Linden Labs por la lokaĵo (servila spaco) kaj metis konstruaĵojn kaj seĝojn, ktp por liaj gastoj. Li helpis min kaj aliajn komencantojn kun niaj vestaj kaj komunikaj problemoj.

Dimanĉe je la 19:00-a horo universala tempo (aŭ 11:00-a horo DV tempo, kiu estas je pacifika horzono) Esperantistoj el la tuta mondo kunsidas. Lastfoje estis dek avataroj kun animoj en Kanado, Kalifornio kaj Teksaso en Usono, Danlando, Japanio, Brazilo, Barato, kaj Germanio. Ni diskutis lingvojn, vojaĝadon, komputilojn, librojn, politikojn, etnajn kaj naciajn diferencojn, religion, la nekredeblan G. Bush – la kutima esperanta konversacio. Intertempe, en la frua vespero persono aŭ du hazarde vizitis la landon. En frua oktobro ĉijare la unua Universala Kongreso en DV okazis. Renato Corsetti kaj aliaj eminentuloj prelegis.

Kursojn por lerni Esperanton DV ofertas. Ne antaŭvideblas kiom pli longe niaj korpoj en la UV (unua vivo) devas fizike vojaĝi. La seĝo antaŭ la kompulio tre komfortas.

Por informo pri DV en la esperanta lingvo, vizitu: http://www.freewebs.com/duavivo/index.htm

Por informo pri DV kaj aliĝilo en la angla lingvo: http://secondlife.com/

— Reni Porter

## UNIVERSALA KONGRESO EN LANDO MALEKZISTA

pruntepreninta de la Redakcio de „Libera Folio”
http://www.liberafolio.org/2007/duavivo/

La reta mondo „Second Life”, esperante ofte nomata „Dua Vivo”, estas eble la plej populara el la multaj „virtualaj universoj” kiuj lastatempe furoras en interreto. En tiuj virtualaj mondetoj la membroj povas pere de siaj rolfiguroj diversmaniere aktivi, amuziĝi kaj kunlabori. La esperantistoj en Dua Vivo aranĝis sian unuan neformalan renkontiĝon en julio, en septembro la rolfiguroj de 16 esperantistoj el naŭ landoj kunsidis por diskuti la organizadon de la Esperanto-agado en Dua Vivo, kaj komence de oktobro en la virtuala hotelo Babelo okazis la unua DVUK, aŭ Duaviva Universala Kongreso de Esperanto.

La partopreno en la unua malreala Universala Kongreso estis neamasa - estis nur 25 aliĝintoj. Honora gasto, Alta Protektanto kaj ĉefpreleganto estis Renato Corsetti, la antaŭa prezidanto de UEA. La tuta prelego de Renato Corsetti pri la temo „La malbona lingvo” spekteblas en la retejo de Dua Vivo.

Oni komentis, „Mi ĉeestis la lastajn kelkajn horojn de la Esperanto-kongreso kaj tre surprizis min ke ĝi fakte estis tre prestiĝa evento (ĉeestis inter aliaj Renato Corsetti) kaj tre bona sperto! Ili faris la kongreson serioze, mi ĉeestis du prelegojn bonkvalitajn kaj interesajn (kaj enhave kaj lingve). Mi ne sciis ke nun en Dua Vivo ili havas tre bonkvalitan voĉkomunikadon, do mi vere povis aŭskulti la prelegojn kaj ankaŭ vidi la lumbildojn kaj la avataron de la preleganto, kiu tre efikis. Estis sufiĉe multaj ĉeestantoj,” skribas Paul R en la forumo de Junularo Esperantista Brita.

Renato Corsetti mem iom skeptike sintenas al Dua Vivo, sed opinias, ke ĝi povas utili por izolitaj esperantistoj. „La tuta koncepto de Dua Vivo ŝajnas al mi stranga kaj mi ankoraŭ ne komprenas kial homoj volas eniri ĝin. Mi kredas, ke temas pri granda fantazia ludo, en kiu vi povas realigi viajn kaŝitajn revojn. Ĉu vi volas esti reĝo de pacifika insulo? Tion vi povas realigi. Vi konstruas vian insulon, vian

reĝan palacon, ktp... En la okazo de esperantistoj en Dua Vivo, tamen la afero funkcias iom alimaniere. Ĝi funkcias kiel tutmonda virtuala loka klubo, kiu kunvenas ĉiusemajne. Entute temas pri eksperimenta agado, kiu certe estas utila por esperantistoj tre izolitaj en la unua vivo sed kun granda komputilo kaj kun tempo."

Unu el la izolitaj esperantistoj estas la duavivano Bergino Dale el Norvegio: „Dum mezuma vespero en Dua Vivo mi uzas kaj Esperanton, kaj la norvegan, kaj la anglan lingvojn. En la vera vivo mi loĝas en malgranda urbo, kaj ĉi tie tute ne estas aliaj esperantistoj. Dua Vivo donis al mi la ŝancon ekkoni aliajn esperant-istojn kaj fari aferojn kune kun ili. Mi antaŭe interŝanĝis mesaĝojn en <u>Lernu!</u> kaj <u>Amikumu</u>. Mi provis ankaŭ ordinaran babilejon. Sed tiujn metodojn oni ne povas kompari kun Dua Vivo. Post kiam mi ekkonis esperantistojn en Dua Vivo, mi denove ekemis uzi tempon por plibonigi mian Esperanton. Mi ne plu estas 'sola en la mondo' kun mia Esperanto," ŝi rakontas.

Simpla uzado de Dua Vivo estas senpaga, sed por havigi propran terenon necesas pagi. Dua Vivo havas propran ekonomian sistemon kun propra valuto. Eblas ne nur elspezi sed ankaŭ gajni monon en Dua Vivo. Multaj vere ekzistantaj entreprenoj jam starigis siajn oficejojn en la virtuala mondo por fari reklamon.

La 1-a DVUK okazis en Esperanto-lando, kreita de Erick Nykvist, kiu gajnis la monon por la nova lando en la lud-universo de Dua Vivo. „Kiam mi aliĝis al Dua Vivo antaŭ unu jaro, mi preskaŭ neniam renkontis Esperanto-parolanton. Kaj mi trovis du Esperanto-lokojn, kiuj poste malaperis. Mi laboris dum kvin monatoj kiel sekurec-gardisto en Dua Vivo, kaj gajnis sufiĉan monon por aĉeti landon. Do, mi decidis aĉeti - kaj fondis Esperanto-landon. Mi mem konstruis la unuajn domojn, sed poste mi ekhavis kontakton kun Alekĉjo el Francio, kiu multege helpis renovigi kaj beligi la landon. Poste mi iniciatis la konversacian rondon kaj poste la 1-an DVUK-on, kaj nun vizitas la landon inter 25 kaj 30 esperantistoj ĉiun tagon. Kelkaj luas apartamenton aŭ hotelĉambron tie, kaj tiumaniere subtenas kaj helpas pagi la monatajn elspezojn," Erick Nykvist rakontas.

Krom Esperanto-lando, ekzistas ankaŭ aliaj ejoj kun rilato al Esperanto en Dua Vivo. Dua Vivo estis kreita de Linden Laboratories jam en 2003, sed ĝi vere ekfuroris nur tri jarojn poste. En oktobro 2007 la virtuala universo havis jam preskaŭ dek milionojn da membroj. Tamen multaj membroj efektive malofte aŭ neniam eniras la universon. Ĝenerale kelkdek mil uzantoj povas troviĝi samtempe en Dua Vivo, kaj la plej multaj el ili estas usonanoj. La fasado de Dua Vivo ekzistas en kelkaj lingvoj, kaj esperantistoj nun eklaboris por starigi esperantan version.

Unu el la plej konataj esperantlingvaj uzantoj de Dua Vivo estas Anna Löwenstein, kiu komence estis skeptika al la ideo, sed nun planas mem aranĝi perfektigan kurson por la duavivaj esperantistoj. Ŝi jam ekpensis pri disvastigo de Esperanto inter la neesperantistoj en Dua Vivo. La ĉefa utilo de Dua Vivo tamen laŭ ŝi estas alia: „Efektive, en Interreto miloj da homoj lernas Esperanton, rilatas inter si, sed tute ne aktivas en la tradicia movado, eventuale eĉ ne scias pri ties ekzisto. Mi pensis, ke estus bone, se UEA starigus Esperanto-centron en Dua Vivo, kiu povus funkcii kiel kunligilo inter la mondo de Interreto kaj la tradicia movado," ŝi skribas en retejo pri Dua Vivo.

Aliĝinte al Dua Vivo, ŝi malkovris, ke jam ekzistas vigla Esperanto-grupo tie. En majo 2007 la grupo havis 180 membrojn, kaj kvar monatojn poste jam 240. „Ĉu vi iam aŭdis pri alia Esperanto-grupo kiu kreskis de 180 ĝis 240 en kvar monatoj? Dum tiu mallonga periodo aperis ankaŭ pluraj Esperanto-centroj. La plej aktiva estas Esperanto-lando, fondita de Erick Nykvist, kie konversacia grupo renkontiĝas regule ĉiudimanĉe. Tie oni trovas homojn el Eŭropo, Ameriko kaj Azio: ĉu vi konas alian Esperanto-grupon, kiu renkontiĝas ĉiusemajne kun membroj el la tuta mondo? Kaj efektive, eĉ ekster la regulaj kunvenoj oni ĉiam trovas tie esperantistojn, kun kiuj babili."

## Esperantistoj trovis alian uzon de DuaVivo

Afiŝita de Emilio Cid al la retloko de Libera Folio

La nomo DuaVivo (Second Life) alvokas al iu malsana, freneza. Loko kie homoj provas realigi fantaziojn, kiujn ili ne kapablas realigi en la vera vivo. Tie oni povas esti, forta, juna kaj bela. Eble tiu estis la intenco de la kreinto Charles Linden.

Sed esperantistoj trovis alian uzon de DV. Esperantistoj ne povas en la reala vivo paroli sian lingvon en la stratoj. La dano Erick Nykvist, tamen kreis Esperanto-landon en DV, loko kie esperantistoj povas paroli Esperanton ĉiutage.

Estas interese kaj mirinde, ke mi, kiu loĝas en la sudaj tropikoj povas paroli voĉe kun Bergino, amikino kiu loĝas en la nordo de Norvegio, kun Giridhar el Hajderabado (Barato), aŭ kun Enrique el Kalifornio.

Krom la vivan babiladon, mi vidis bonajn prelegojn kaj havis oportunon fari demandojn al la prelegantoj. Tie mi partoprenas kurson de Anna Löwenstein por plibonigi mian lingvo-nivelon. Ĉu per alia maniero mi povus lerni kun akademiana instruisto, komforte en mia hejmo?

Estas aliaj voĉaj babilejoj, sed la vida ebleco de DV estas tre alloga. Ni konstatis ke homoj povas aŭskulti pli longajn prelegojn, se ili havas la vidan kontakton. Ne nur la pupeto de la parolanto, sed ankaŭ la bildoj de la prelegoj, la arboj, herbo, konstruaĵoj. Ĉio kontribuas al tiu bona etoso de Esperanto-lando.

Mi invitas vin vidi videon de la prelegoj okazintaj en DV ĉe www.videoj.uni.cc

http://www.liberafolio.org/2007/duavivo/

## LA UNUA DUAVIVA UNIVERSALA KONFERENCO DE ESPERANTO

pruntepreníta de la retloko de Esperanto-USA

Dum la 6a kaj 7a de oktobro, 2007, okazis la unua universala konferenco ĉe la virtuala mondo, Second Life. Ni faris same, kiel oni faras ĉe konferencoj en la reala mondo. Ni kaj babilis, kaj dancis kaj ĉeestis prelegojn kaj ekskursis.

La afero estas la rezulto de la laboro de dano, Erick Nykvist. Fakte, tio estas la nomo de lia avataro. Aliuloj helpis lin, sed li estis la gluo, kiu tenis kune la diversajn partojn de la afero. Sinjoro Nykvist faris mirinde. Estinta prezidanto de la UEA, Renato Corsetti, faris avatare la komencan prelegon, priskribante la oportunon por kreskigi la esperantan movadon per Dua Vivo.

La kongreso daŭris dum 24 horoj. Oni asertis, ke la kialo estis, ke membroj de la tuta mondo povas partopreni. Sed, mi neniam vidis iun ajn de Japanio aŭ Koreio aŭ eĉ Barato. Fakte, oni ne planis eventojn, kiuj okazis dum la vekaj horoj en Azio.

Miaopinie, la afero estis ĉefe eŭropa. Tio ne surprizis min, ĉar la eventoj devis okazi dum la eventigantoj estas vekaj. Ne vere estis kialo por daŭrigi la konferencon dum 24 horoj.

Malgraŭ la eŭropa etoso, mi kalkulis ke proksimume 20 homoj (eŭropanaj kaj amerikanoj) partoprenis. Ankaŭ vizitis kelkaj homoj, kiuj ne povis partopreni, ĉar ili ne pagis la koston de eniro. ($1.00 aŭ proksimume ½ Eŭro.)

Mi vere kredas, ke la virtuala mondo estas tre bona loko por renkonti aliajn esperantistojn tra la mondo. Sed mi ankaŭ kredas, ke oni devas plani la kongresojn plibone. Finfine, mi kredas ke sinjoro Nykvist faros plibone estontece, precipe se li havus helpon de amerikanoj kaj azianoj.

— kontribuis „Dreah” ĉe http://www.esperanto-usa.org/

## DUA VIVO POR ESPERANTISTOJ

Ju pli mi pensas pri la nomo Dua Vivo, des pli mi komprenas kiel ĝi ja reflektas mian situacion, kaj eble tiun de multaj aliaj samideanoj. Jen: dum jaroj, mi ekzistis kiel esperantisto en ia vakuo. Mi havis kontakton kun samideanoj pere de retpoŝto. Tiu vere ne estis satige. Mi foje povis babili kun uloj en programoj kiel Paltalk, ĉu tajpe, ĉu voĉe. Tiaj aferoj helpis iomete rompi la senton de izoliteco.

Tamen, nun pere de Dua Vivo, mi havas la eblecon kelkfoje dum la semajno babili kun granda aro de Esperanto-parolantoj el Azio, Sud-Ameriko, Eŭropo, kaj eĉ el Kanado kaj Usono. Dum kelkaj minutoj, mia sento de izoliteco estas rompita.

Por adiktemaj uloj, ekzistas vera danĝero de troa mergiĝo en tiun foje strangan duan vivon, kaj neglekto de onia Unua, Reala Vivo.

Tamen, se vi estas aventurema persono, provu Duan Vivon, kontaktu la samideanojn en Esperanto-Lando, kaj ĝuu!

— Allan Fineberg
http://www.esperanto-usa.org/

[La redaktoro multe dankas al Reni Porter pro lia ideo verki pri Dua Vivo.]

### La redaktoro denove pardonpetas

Denove mi multe pardonpetas pro la terura malfrueco de ĉi tiu numero de ***Inter Ni***. La ŝuldo pro tio tute estas la mia. Mi deziras multe danki al Steĉjo Norvell pro sia heroa laboro por helpi min pri ĉi tiu kaj ĉiuj aliaj numeroj de nia gazeteto. Li ĉiam tre ĝentile instigas al bona laboro, kaj pro tio dependas la sukceso de ***Inter Ni***.

— Via redaktoro,
Bob Williamson

Nur unu semajnon post la translokiĝo en sian unuan apartamenton, Eduardo telefonvokis al la patrino por plendi pri la novaj najbaroj. „Unu virino ploras la tutan tagon, alia restas en la lito ĝemante, kaj estas viro kiu daŭre frapadas la kapon kontraŭ la muro.” „Vi prefere evitu ilin,” diris la patrino. „Tion mi faras. Mi restas la tutan tagon en la apartamento kaj ludas la tubjon.”

— Alan Owens, ***Reader's Digest***

☺ ☻ ☺ ☻ ☺ ☻ ☺ ☻